

flandra katoliko

Maandblad van het
Katholiek Vlaamsch
Esperanto - Verbond
K. V. E. V.

Monata Organo de
la Flandra Unuiĝo
Katolika Esperantista
F. U. K. E.

Redakcio, interŝanĝservo kaj adreso por alsendo de recenzotaĵoj:
JUSTUS MERKS, Goedendaglaan 109, KORTRIJK (Belgujo). Pĕk. 4898.04.

Abonprezo kun membrekotizoj FUKUE kaj IKUE 50 Bfr. Abonprezo por eksterlandanoj: 60 Bfr.
Pĕk. 4123. 54, K.V.E.V. ANTWERPEN (Belgujo).

VOĈO EL HISPANUJO

Post la terura mondmilito, kiu tiom suferigis la eŭropajn popolojn, la mondo serĉas denove la pacan vojon kaj la popoloj revas pri vera homama interkompreno kaj kunlaboro. Sed la fortoj de la malbono ne tute malaperis kun la nazia, krima perforteco; ĉar inter la venkintoj estas nacio, kiu ne volas la pacon, sed la mondan haoson, sur kiu ties regantoj esperas konstrui la mondan revolucion post sovaĝa detruo de la multjara konstruaĵo de nia okcidenta civilizeco.

Tiu nacio, kiu en sia teritorio forigis ĉian liberecon socian, religian kaj ĵurnalan, kiu regas sian popolon laŭ naziaj rimedoj, komencigis tra la tuta mondo vastegan agadon kontraŭ la katolika Hispanujo, kiu estas prezentata al la popoloj kvazaŭ suferanta teruran kaj senliberecan reĝimon, kaj ĉar tio estas malvera, ni, Hispanoj, volas sciigi al la tuta mondo la veron pri nia situacio.

Ke nia Registaro kaj nia ŝtatestro ne estas faŝistoj sendube elpruvas nia konduto dum la milito. Germanujo multfoje petis al Franko partoprenon en la milito flanke de Germanujo kaj Italujo, sed tiuj petoj estis ĉiam rifuzataj, kaj same la peto pri libera paŝo al germana armeo tra la hispana teritorio en Nord-Afrikan estis ri-

fuzita. La hispana konduto estis ĉiam bazita sur la plej granda respekto al ĉiu ŝtato. Sed nun la monda komunistaro pretendas, ke la hispana reĝimo estis starigita de la faŝistaj Italujo kaj Germanujo, kaj tial oni devas ĝin forigi.

Kvankam la Hispanoj decidis jam antaŭlonge la de ili trairetan vojon kiam ili batalis sub la ordono de Franko kontraŭ la internacia komunistaro, kaj la hispana popolo ne kutimas atenti la atakojn de krimuloj, mi kredas konvene alvoki ĉiujn honestajn kaj bonvolajn homojn, vere amantajn la veron, prijuĝi objekte kaj senpasie la aferon. Rememoru ĉiu tion, kio okazis en nia lando dum la ruĝa regado. Episkopoj, sacerdotoj, monaĥoj, monaĥinoj, honestaj homoj kaj laboristoj estis sovaĝe mortigataj milope je la nomo de tiu « libereco », kiun volas donaci al ni la servantoj de Stalin. La ruĝa registaro muligis eĉ la plej elementajn homrajtojn, kaj nenian liberecon ĝuis tiuj, kiuj ne apartenis al la komunistista partio, la vera reganto de la ruĝa parto el Hispanujo.

Kontraŭe zorgis la nacia armeo pri ĉio kaj en la nacia parto regis ordo kaj bonfarto. Leĝoj bonfarantaj al la laboristaro, sociaj asekuroj, sana kaj abunda manĝaĵo, altaj salajroj, frateco kaj amo, tia estis

la regado de Franko kaj tial la Hispanoj decidis ĉiam esti regataj de li, kaj ni ne plu toleros, ke iu ajn popolo sin miksu en niaj internaj aferoj, kaj intencu instrui nin pri tio, kion ni devas fari.

Sed restas ankoraŭ io: ni demandas al ni, kial tiuj kriantoj ne petas la saman liberecon, kiam ili diras deziri al ni, por Rumanujo, Hungarujo, Polujo, Estonujo, Litovujo, Latvujo, Finnlando, Bulgarujo, Aŭstrujo, Iranujo kaj tiom da aliaj popoloj kiuj perdis sian liberecon, forrabita de iliaj « liberigintoj », kaj nun ĝemas sub la pezo de la rusa botego? Kial la sufero de tiuj popoloj ne tuŝas la koron, se ili ĝin havas, de tiuj plendantoj? ... La respondo estas facila: en tiuj landoj la kruco estis forigita kaj la komunismo, kaŝe aŭ malkaŝe, regas tie. En Hispanujo, male, la kruco prezidas la lernejojn, la religio estas respektata de la ŝtato kaj tion ne povas toleri la komunistaj kontraŭkristanoj. Sed ili forgesas, ke la Dia Povo estas je nia flanko kaj — ili krii aŭ ne — ni, Hispanoj, antaŭeniros kun Franko kaj Dio.

Federico Rivelles Giménez.

Castellon de la Plana, Aprilo '46.

Ĉi supran leteron senŝanĝa ni presigis en nian revuon, ne tial ke ĝi havus nian senkondiĉan aprobon, sed precipe pro tio ke ĝi donas al ni okazon je principa precizado.

Tia letero metas ja antaŭ nia juĝo multegon da tre komplikitaj demandoj el kiuj elstaras jenaj: ĉu rajtas ni, esperantistoj, aŭ tutsimple ni, homaranoj, nin miksi en tiaj politikaj disputoj? Se jes, ĉu ni havas la moralan devon fari tion? Fine, ĉu ni povas ĉiam fari tion oportune, alie dirite, profite al la solvo de tiaj malkonsentoj?

Tiuj estas nur kelkaj el la demandoj kiuj amase sin trudis al ni, kaj ni ne havas la intencon respondi detale, eĉ nur al la tri ĉi supraj.

Laŭ nia opinio la respondo al la unua demando estas nepre jesa.

La mondo, la homaro, tio estas ni! Ĝi estis ĉiam, kaj estas nuntempe preskaŭ palpeble, kvazaŭ korpo, kies membroj, eroj aŭ ĉeloj estas ni. Se ie ajn la korpon oni atakas, ĉiuj ĝies membroj estas en danĝero de sufero eĉ morto.

La mondo estas unuo, tuto. Komparu

nur la tiurilatajn eldirojn de gravaj politikistoj. Estas krome pra-demokrata principo ke ni respondecas pri la vivo, la bonfarto, la sano, la feliĉo de niaj kunhomaranoj; ili estas ja niaj proksimuloj! Ĉu ni ne legas en la Evangelio ke Jesuo nomas la Samaritanon, la « fremdulon », la proksimulo de la prirabita juda vojaĝanto? Ni devas konkludi el tio, ke ĉiuj tiuj estas niaj proksimuloj pri kies malbonfarto, malsano, sufero, danĝero ni havas konon. En la pasinteco estis neeble aŭ almenaŭ tre malfacile scii ion kun precizeco pri la suferoj de malproksimaj popoloj, kaj materie neeble ankaŭ estis helpi ilin. Sed kun la nuntempaj rimedoj eĉ la plej malproksimajn, suferantajn, endanĝeritajn popolojn kaj personojn ni povas almenaŭ iomete helpi, helpante certajn instancojn, kiel la Ruĝan Krucon, la papajn bonfarajn entreprenojn, kaj, en la kazo kiun ni pritraktas ĉi tie, la gazetojn, ĵurnalistojn ktp, kiuj penas konigi al la granda publiko la verajn kaŭzojn de tre danĝera hetzo kontraŭ grupo de niaj proksimuloj.

Alia afero estas la enhavo mem de la letero, ĉi ties vereco. Nu, tiu enhavo, senigita de sia mankhava prezentado, aspektas sufiĉe verŝajna. Ni scias ja, ke tiuj kiuj sin prezentas al ni kiel la reprezentantoj de la komunistaro estas plejparte senskrupulaj fiuloj aŭ, minimume, danĝere nerespondecaj demagogoj, kiuj respektive intence subpremas eĉ murdas siajn kontraŭulojn, aŭ ne enkalkulas la eblecon ke tion faros senskrupulaj kunpartianoj. La okazintaĵoj en Hispanujo mem, en Italujo, Japanujo kaj Germanujo, la okazintaĵoj en la ankoraŭ ĉiam kaj ĉie ekzistantaj koncentrejoj tion sunlumklare evidencigas.

Sed tamen ni rajtas dubi kaj enketi pri la faktoj, kiujn oni rakontas al ni, formi opinion pri la oportuneco de eventuala helpo kaj pri la prezentado, la vortigo de la helpopeto kiu lasta ŝajnas al ni ege mankhava. Pro tio ni opinias konvene aldoni al ĉi tiu letero iom detalajn margenajn notojn.

La mondo serĉas... El la sekvanta parto de la leterenhavo montriĝas ke fakte ne la tuta mondo serĉas la pacan vojon. Negravaĵo, oni diros, estas kutima esprimmaniero. Mi konsentas, sed ĝi aperigas unuan rimarkindaĵon pri la letero kaj aliaj sam-

specaj komunikadoj, sciigoj, plendoj ktp.: la ĝeneraligadon. Oni uzas kutimajn esprimmanierojn pri kiuj oni jam ne plu rimarkas ke ili estas, pro sia tro ĝenerala senco, malĝustaj, neveraj, eĉ falsaj.

La popoloj revas... Sama rimarko kiel supre.

Inter la venkintoj estas nacio... Refoje sama rimarko. Ĉu vere la tuta rusa nacio ne volas la pacon aŭ estas ĝi simple ne kapabla, ĉar malhelpita, konigi al la mondo alian opinion ol tiun, kiun kriegas kaj kriegigas al ni ĝiaj gvidantoj? Pro la amo de Dio, kiam fine niaj publicistoj agnoskas tiujn du simplajn, okulfrapajn faktojn, ke nek iu simplulo el Rusujo, Hispanujo, Germanujo aŭ Ieajnujo, nek eĉ la amaso de la simpluloj el iu ajn lando, respondecas pri la faroj de siaj gvidantoj, eĉ kiam tiujn lastajn ili voĉdone elektis! Estas tiel facile en nia « demokrata » epoko al eta plimulto kaj eĉ al eta malplimulto malbonuzi la regnopotencan!

Neniam ni atingos amikajn interrilatojn inter la popoloj, eĉ ne inter la honestaj, lojalaj grupoj el la popoloj, se ni kontinuas respondecigi tutajn popolojn por la faroj de kelkiuj el inter ili, eĉ se eventualaj krimuloj estas la popolgvidantoj mem.

Inter la « kvalitecaj mankoj » de tiuj lastaj estas preskaŭ ĉiam ambicia regemo, kiu malfacile rezistas la tenton, kiun la diablo konservis kiel la lastan kaj plej potencon por delogi Jesuon mem: « ĉion tion mi donas al vi, se vi volas adori min. » Min! Tio volas diri, la spiriton de l' malbono. Alivorte, regi, aŭ pli ĝuste, estraci, ne malofte iuj klopodas kaj sukcesas per cedado al la laŭtege, minace esprimitaj, malbonaj inklinoj de malplimulto da senkonsciencaj fiuloj. Ĉu tiukaze la trompita, kaj-portempe-senpova plimulto respondecas pri la krimoj faritaj en sia nomo? Neniel, ĉu ne?

Tiu nacio... Ankoraŭfoje, ĝeneraligado!

Kontraŭ la katolika Hispanujo... Refoje, ĝeneraligado! Ĉu vere ni povas paroli pri « katolikaj » Hispanujo, Francujo, Belgujo ktp, kiam tedfoje montriĝas ke granda parto, eble eĉ plimulto de la loĝantaro de tiuj landoj tute ne kondutas katolike? Ke multaj enloĝantoj de tiuj landoj estas malobeemaj al la ordonoj, rifuzemaj al la petoj kaj preĝoj de siaj sacerdotoj, episkopoj, eĉ al tiuj de nia komuna patro, la Papo? Rekonu la faktojn ke malbonaj

katolikoj, apostatoj ktp., estas pretaj, kiel fihelpantoj de ne-katolikoj kaj sendiuloj, subpremi la katolikajn fidelulojn, kaj la verajn kristanojn; ke grandegaj partoj de la katolikaj enloĝantaroj, plejparte simpluloj — mi koncedas je ilia senkulpigo, — lasas fari siajn malamikojn, samkiel ili lasas laboregi solaj siajn protektantojn, nek helpante la lastajn, nek malhelpante la unuajn; tion rekoni, mi ripetas, estas nemalhavebla kondiĉo por vidi klare en la nuntempaj, konfuzegaj cirkonstancoj.

Ni Hispanoj... Bonvolu, kara leganto, pensi kion mi ne plu kuraĝas ankoraŭfoje surpaperigi. Aliaj Hispanoj ja estas, kiuj laŭtege krias: « ni, Hispanoj, volas sciigi al la tuta mondo la veron pri la situacio en nia lando! » La respublikanojn mi volas aludi. En tiaj kazoj ne malofte la veron oni trovos ie en Mez« uj »o, se ne en Neni« uj »o.

Ke nia registaro kaj nia ŝtatestro ne estas faŝistoj sendube elpruvas nia konduto dum la milito.

Unua rimarko. Tiu konduto tion tute ne « sendube » elpruvas. Tiu konduto ĝuste kaj nure verŝajnegas ke la tiutempaj, hispanaj registaro kaj ŝtatestro ne emis militi. Rilate al la kialojn ni palpas en la malumo de la diplomata sekretaĉaro.

Dua rimarko. Kial, je la lipharareto de formortinta Hitlero! elpruvi tiun ne-faŝistecon? Supozu, ke iam montriĝos ke nur certaj specoj de faŝistoj ne taŭgas, la maldekstruloj ekzemple, kaj povas ekzisti bonaj, bonegaj dekstraj uloj de la faŝista speco! Tiukaze oni por ĉiam kaj senplie sin elpruvus el la faŝistanaro, ankaŭ el tiu de la taŭga speco! Ho, veo! Ho bedaŭrinda domaĝo! Krome, ekzistas personoj kiuj tut-tut-mal-laŭte kuraĝus opinieti ke... ke... — ĉu mi dirus ĝin? — ke honesta faŝisto eble estas, povas esti pli bona ol neo-faŝista demokrato. Pensu do! Kia blasfemaspekta supozo!

Mi kredas konvene... Jen fine la ĉefaĵo! Objektive kaj senpasie — ankaŭ sen la pasioj nomataj malamo, revengemo! — ni devus prijuĝi la aferon, ĉiun ajn aferon. Por ĉiu kristano kaj, a fortiori, por vera katoliko, la ununura demando devus esti ĉu iu homo — amiko aŭ malamiko, estas egale — bezonas helpon, merititan aŭ ne, estas refoje egale! Se montriĝos ke jes, aliaj demandoj postulos solvajn demandojn: ĉu ni kapablas doni helpon, ĉu ni

estas eble morale devigitaj ĝin doni ktp. Al tiuj demandoj ni ne donu tro rapide neajn respondojn. Ĉikaze mi opinias ke ni devas helpi la hispanan grupon de niaj kunhomoj, direkte se eble, aŭ indirekte, helpante la prirespondajn politikistojn trovi justan solvon al la hispana problemo, aŭ indigne protestante se ili volas subpremi iun ajn plimulton nur postulantan siajn justajn liberecojn.

Gravan limigan kondiĉon mi devis aldoni al ĉi tiu lasta frazo. Ĝi povus verdire formi titolon de tute nova ĉapitro, kiun mi nun ne povas aldoni; mankas loko, mankas tempo. Krome, ĉu estas necese ke mi plue kritiku la enhavon de la letero, aŭ

ĈU ESPERANTO KONTENTIGAS LA FONOLOGAJN POSTULOJN DE MONDA HELPLINGVO ?

La universitataj filologoj, nerezisteble impulsitaj de la tielnomataj « diletantoj », fervore ekinteresiĝas pri la problemo de la monda helplingvo. N. Trubetzkoy, de la Praha Fonologa Altlernejo, priparolas en « Travaux du Cercle de Linguistique de Prague » (Verkoj de la Praha Lingvista Rondo) la problemon « Kia estu la Sonsistemo de artefarita, internacia Lingvo ? » Alivorte: el kiuj sonoj estu konsistigita monda helplingvo por ke ĉiuj popoloj povu sen troa peno ĝin paroli.

Estas fakto ke ĉiu vivanta lingvo prezentas tutaĵon de sonoj kaj sonkombinoj. Jen kio kaŭzas, ĉe la lernado de fremda lingvo, tiujn malfacilaĵojn, kiuj devenas de la diferencoj aŭ fonologaj kontrastoj, malestantaj en la gepatra lingvo. Por ke iu lernu distingi ĉi tiujn kontrastojn longdaŭra ekzercado estas necesa, kiun multaj eĉ ne kapablas provizi. Tiel Valono, lernanta la nederlandan lingvon, ordinare ne perceptos diferencon inter la prononcadoj de « *staat* » kaj « *stad* », « *speel* » kaj « *spel* »; en la franca lingvo ne ekzistas la fonologaj kontrastoj: longa a (a:) / mallonga a (a), longa e (e:) / mallonga e (e).

La Ĉinoj kaj Japanoj, samkiel iuj Bantu-triboj, ne sentas diferencon inter la « l » kaj « r » sonoj, dum ke la Araboj elparolas « p » kiel « b », tial ke la « p » ne ekzistas en ilia lingvo. Tial la Ĉinoj diras « *Malia* » anstataŭ « *Maria* », kaj la Araboj nomas

pli ĝuste, la prezentadon de la enhavo? Mi ne ŝatas fari tion. Mi bedaŭras eĉ iomete ke mi prenis ĝuste tiun ĉi specialan leteron por kritiki la ĝeneralan kutimon de la ĝeneraligado. Ĉar ne dubu pri tio, kara leganto, ke letero de iu maldekstra Hispano donus okazon al identa kritiko, eble eĉ al pli severa. Sed mi sentis min devigita averti miajn gesamideanojn kontraŭ la danĝero de la ĝeneraligado. Post iom da atento kaj ekzercado oni povas facile eviti ĉi tiun malbonaĵon. Honoru ni nian karan lingvon nur uzante ĝin por diri kaj eltrovi la veron.

Justus Merks.

vin france « *mon père* » anstataŭ « *mon père* ».

Kunmeti mondan helplingvon nur per la fonologaj kontrastoj troviĝantaj ĉe ĉiuj lingvoj ne estos facile, tial ke tiukaze la vortoj perdos iliajn internaciajn ortografion kaj elparolon. Por kontentigi la Ĉinojn ne devus esti malsameco inter « l » kaj « r »; por esti utile al la Japanoj ankaŭ ne devus esti diferenco inter « f » kaj « h » (tiuj ja diras « *fi* » aŭ « *hi* » parolantaj pri « *fajro* ») kaj kompleze al la Araboj oni devus forigi la « p » ktp. ktp.

El praktika vidpunkto tio estas ne efektivebla. Tial estus pli bone akcepti Esperanton tia, kia ĝi estas.

Rilate al iuj popoloj lernontaj Esperanton troviĝos en ĉi tiu monda lingvo ankaŭ homonimoj aŭ samsonaj vortoj. Konsidere al la Japanoj kaj Ĉinoj la vortoj *malo/maro*, *kolo/koro*, *lano/rano*, *vero/velo*, *iri/ili* ktp. estas samsonaj, samkiel por ni nederlandlingvanoj, *kolen/koolen*. La kunteksto tamen montros tuj la senediferencon, samkiel ja ni senpene distingos « *kolen* » — *karboj*, disde « *koolen* » *brasikoj*. Cetere la ortografio klare montras ĉi tiun diferencon, almenaŭ antaŭ la starigo de la novaj ortografiaj reguloj.

Alia malfacilaĵo estas jena. Multaj lingvoj, kiaj la ĉina, japana, ktp., ne toleras kombinojn de du aŭ pluraj konsonantoj krom tiu de la nazala grupo sekvita de samorgana konsonanto, t.e. nd, nt, mb, mp, ktp. en vortoj kiaj « *wang* » (ĉine = maljuna), « *yorokondaru* » (japane = kontenta), « *muntu* » (kikonge = homo), ktp.

La vortojn kiujn ili ĉerpas el la eŭropaj lingvoj pro tio ili adaptas al sia sonsistemo per intermetado de vokaloj. La vortoj « *stoel* » (nederlandlingve/esp. = seĝo), *verbe* (france/esp. = verbo), *Christ* (france/esp. = Kristo), alprenitaj de iuj Bantu-lingvoj estas elparolitaj « *s(e)tul(o)*, *ver(e)be*, *K(i)ris(u)to*.

Kiam la popoloj kiuj parolas tiajn lingvojn eklernas Esperanton, ili intermetaĵe spontanee vokalon kie troviĝas du sinsekvaj konsonantoj kaj eĉ almetis vokalon ĉe la fino de la vortoj.

Por solvi ĉi tiun problemon sufiĉus starigi la regulon ĉiam intermeti la saman vokalon, ekzemple la « e » (kio plej ofte okazas spontanee) kaj elparoli ĝin kiom eble plej surde. Sekve oni aŭdus *Keriseto*, *verebo*, *vinetero*, *onekelo*, *ineseteruiseto*, *sekeribi*, *sube*, *kevanekame*, ktp. Tiu « e » tamen ne skribiĝus, tiel ke la skriba vortbildo restus sendifekta; ĝi nur aldoniĝus ĉe la elparolado. Ankaŭ en la ĉeĥa lingvo,

ekzemple, la obtuza « e » ne skribiĝas: oni skribas « *prst* » (fingro), elparolita « *perst* », ktp. Tiamaniere ankaŭ malebliĝus la allokigo de l'akcento, tial ke la konsonanto, sekvita de la intermetita « e » ne formus silabon. La intermeto de la « e » memkompreneble nur toleriĝus kiam la parolanto alie ne kapablas sendifekte elparoli la konsonantojn.

Ni akceptas do la principon ke monda helplingvo, ankaŭ rilate al la prononcado estu por ĉiu facila. Al milionoj da Ĉinoj kaj Japanoj Esperanto ne kaŭzos malfacilaĵojn se ili komencas per la intermetado de la « e », kie tio estus necesa, kaj alkiutimiĝus al la distingado de la homonimoj. Ekzercante ili iom post iom kapablos elparoli Esperanton, kia la Eŭropanoj. Farante ja oni lernas fari, ĉu ne?

Dom Cyprianus COPPENS O. S. B.
(Esperantigis el la nederlanda lingvo Justus Merks).

Recenzoj

LA FINO de Folke Bernadotte. Eldona Societo « Esperanto », Stockholm. Popoleldono. Prezo: 33 Bfr.

Kvankam subjektiva rakonto, tio ne estas fanfaronado, sed simpla priskribo de la intertraktoj, kiujn Grafo Folke Bernadotte havis kun kelkaj eminentuloj el la disfalanta Germanujo, komence de 1945. Celo estis la liberigado de la skandinavaj malliberuloj el la koncentrejoj germanaj.

Interparoladojn, unue kun Eisenhower en Parizo libera, poste kun Kaltenbrunner, Himmler, von Ribbentrop en Germanujo, ni legas kun ĉiamkreskanta intereso. Poste, la afero fariĝis politika, kiam ankaŭ oni provis, pere de la sveda peranto, interrilati kun la aliancanoj por obteni pakkondiĉojn. Li ankaŭ okaze provis obteni la liberigon de nia kara reĝo Leopoldo IIIa.

Vere leginda rakonto, kiu mallevas iom la kurtenon de post la kuliŝoj.

Bona traduko kun ie kaj tie iom stranga uzo de prepozicioj.

Oni ne timu politikajn teoriojn; nur regas en ĝi homama agado kun abomeno

kontraŭ la kruelaĵoj de la nazi-sistemo.

Gratulojn al Stellan Engholm pro la riĉigo de nia esperanto-literaturo.

Lic. Leo Calloens, Prez. FUKU.

GAJA LEGANTO PER ESPERANTO de P.E. Schwerin. The Esperanto Publishing Company Ltd. Rickmansworth, Anglujo.

Plaĉaspekta libreto enhavanta spritaĵojn, vortludojn, anekdotojn, matematikajojn, rimaĵojn, societludojn, konsilojn por grupestroj kaj kursgvidantoj, kaj eĉ preserarojn. Intencajn, mi volas diri. Mi renkontis la dialeton de la preseraroj. Li furiozis kaj malafablis pri « nelojala konkurenco », « limdifinigo de infludistancoj » k.s. Li restos certege la ununura leginto kiun ne gajigis la legado de ĉi tiu libreto. Sed fakte estas iom nelojale senlaborigi kompatingan dialeton, kiu krome estas samideano, ĉar li ja ankaŭ devis lerni nian lingvon por ke li povu ĝin fuŝortografii... intence!

Jomo.



« DE WAARHEID » en ESPERANTO

Het Katholieke Kampblad « DE WAARHEID » heeft ten opzichte van ons ideaal een vriendelijke daad gesteld door, in een omlijst artikeltje getiteld « Esperanto... de Toekomsttaal », de noodige ruchtbaarheid te geven aan het bestaan van ons tijdschrift, de werking van het « Katolika Esperanto Centro » te Brussel en de leerzamen geleid door E. P. Canisius van Hoogstraten O. Praem. Dit geeft ons de gelegenheid eens te wijzen op de interessante inhoud van « DE WAARHEID » en het feit dat daarin vele artikelen voorkomen die een vertaling in, en verspreiding door Esperanto ten volle waard zijn. Vermelden we verder nog dat redactie en beheer van « DE WAARHEID » gevestigd zijn, Ploegstraat 23, te Antwerpen, dat het tweemaal per maand verschijnt, dat een abonnement per halfjaar slechts 30 fr. kost en kan betaald worden op Postrekening van Geloofsverdediging 151.08 Antwerpen.

BIJ EEN VERKLARING

Met het vorige nummer van ons tijdschrift heeft U een formuliertje ontvangen uitgaande van de « Internationale Esperanto Bond » en een verklaring behelzende, die langs de « Belga Ligo Esperantista » om, bestemd is om te worden ingediend bij de « Organisatie der Vereenigde Naties ». Verzuim vooral niet deze verklaring in te zenden. Het is een kleine moeite die niemand aan zijn ideaal mag weigeren. Onze leden die betreuren dat zulks door bemiddeling van Belga Ligo Esp. moet gebeuren, zullen kortelings voldoening krijgen. Ieder van hen late de 10 ekzemplaren invullen, die wij hen in naam van FUKÉ of IKUE zullen zenden.

ESPERANTO EN RADIO

La Sveda Radio verdetiĝis...

El Stockholm ni ricevis jenan komunikon.

Sveda Radio dissendos programon en Esperanto marde la 16 de aprilo je 15.10-

15.30 grenviĉa tempo (= 16.10 - 16.30 mezeŭropa tempo) per mallonga ondo 19.80 m. La sama programo estos ripetata por ekstereŭropaj landoj merkrede la 17 de aprilo je 1.10 - 1.30 grenviĉa tempo per mallongaj ondoj 31.46 m. kaj 49.46 m.

En venontaj monatoj la Esperanto-dissendo okazos je la samaj horoj la 16(17) de majo, la 14(15) de junio kaj la 16(17) de julio.

Bonvolu sendi informojn pri la aŭskulteblecoj kaj eventualaj programproponoj al « Sveda Esperanto Instituto » Tegelbacken, Stockholm, al kiu estas komisiita de la Sveda Radio aranĝi la Esperanto-programojn.

kaj ankaŭ la Nederlanda !

Hilversum II okazigos, laŭ sciigo en « Esperanto Internacia », regulajn dissendojn, komenciĝantajn la 27an de aprilo je la 14a horo, sub la organizado de la « Federacio de Laboristaj Esperantistoj ». Pripublikitajn raportojn oni sendu al V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum.

PRINTEMPAS EĈ EN GERMANUJO ESPERANTO !

El letero de D-ro Siegfried Ziegler, München en « Esperanto Internacia » ni ĉerpas jenan frazon. « La unuan publikan kunvenon de la grupo en München, 20-1-1946, ĉeestis 250 samideanoj el diversaj lokoj de Sudgermanujo. Eĉ eksterlandanoj partoprenis ». Kiu povus legi tian sciigon sen emocio ? Tiaj samideanoj, tiuj rezistemuloj de la plej alta kvalito, meritas honoran saluton.

TE KOOP

K. Kalocsay & G. Waringhien : Plena Gramatiko de Esperanto. Ing. Fr. 130. — L. Kökény, V. Bleier, K. Kalocsay : Enciklopedio de Esperanto. Geb. Fr. 180. — F. Faulhaber : Tra la Labirinto de la Gramatiko. Geb. Fr. 70. —

Van elk één gloednieuw exemplaar. Adres: Goedendaglaan 109, Kortrijk. Prijzen zijn franko. Bestel door storting op PR. 4898.04, J. Merks.

Lingva Rubriko

MOEILIJKE UITDRUKKINGEN MET MAKKELIJKE WOORDEN

Halt ! Wacht even ! Alvorens de hiernavolgende uitdrukkingen te bezien doe eens de volgende proef. Neem een strookje papier en bedekt daarmee de esperantovertalingen van de uitdrukkingen. Natuurlijk nog vóór dat U die gezien hebt. Probeer dan eens wat U zoo van de vertaling terecht brengt. Geef U zelf een cijfer tus-

schen 0 en 10 naar gelang U het er bar slecht of uitmuntend van af brengt en ga dan eens met een rekensommetje na hoe hoog het percentage is van uw parate Esperantokennis. Maar, eerlijk zijn, zulle ! Niet zeuren.

Jomo.

- | | |
|--|---|
| 01. Houd je taal ! Kom me daar niet mee aan ! <i>Firmtenu vin ! Ne parolu al mi pri tio.</i> | 81. Zacht aan wat, a.u.b. Hij is goed ter tale. <i>Moderigu vin, mi petas. Li estas elokventa.</i> |
| 02. Onze belangen gaan samen. Des te beter. <i>Niaj interesoj akordas. Des pli bone.</i> | 82. Ik had niets te doen. Dat kan niet missen. <i>Mi havis nenion por fari. Tio nepre okazos.</i> |
| 03. Die machlene doet het niet. Met welk doel ? <i>Tiu maŝino ne funkcias. Por kiu celo ?</i> | 83. Hij doet in groenten. Midden in het water. <i>Li estas legomkomercisto. Meze en la akvo.</i> |
| 04. Ik kom vrijaf vragen. Om den dood niet. <i>Mi venis por peti libertempon. Neniel !</i> | 84. Hij doet aan Spaansch. Dat maakt niets uit. <i>Li pristudas la hispanan lingvon. Negrave.</i> |
| 05. Dat gaat niet aan. Dat is op mij gemunt. <i>Tio ne estas tolerebla. Tio celas al mi.</i> | 85. Waarom zeg je niets ? Beter iets dan niets. <i>Kial vi diras nenion ? Pli bone io ol nenio.</i> |
| 06. Dat gaat niet aan. Hij is heel wat mans. <i>Tio ne estas permesata. Li multe kapablas.</i> | 86. Hij kon niets zien. Gij hebt veel gemist. <i>Li nenion povis vidi. Vi multe neprofitis.</i> |
| 07. De wet is er door. Dat komt niet te pas. <i>La leĝo estas akceptita. Tio ne decas.</i> | 87. Dat is op mij gemunt. Wat wil dat zeggen ? <i>Tio estas al mia adreso. Kion tio signifas ?</i> |
| 08. De deur staat aan. Dat laat zich denken. <i>La pordo estas fermetita. Kompreneble.</i> | 88. Ik bemin hem als mezelf. Wie zal 't zeggen ? <i>Mi amas lin kiel min mem. Kiu povas scii ?</i> |
| 09. De deur stond aan. Ik heb met hem te doen. <i>La pordo estis fermetita. Mi kompatas lin.</i> | 89. Er is niets klaar. Daar is niets van aan. <i>Nenio estas preta. Tio estas tute malvera.</i> |
| 10. Gij dient te weten dat... De kerk is al aan. <i>Vi sciu, ke... La diservo jam komenciĝis.</i> | 90. Laten we ter zake komen. Dat is mijn zaak. <i>Transiru ni al la afero. Tio koncernas min.</i> |
| 11. Dat pak zit goed. Het regent dat het giet. <i>Tiu kostumo estas bone alfarita. Pluvegas.</i> | 91. Ik denk van niet. Dat is niet uitgesloten. <i>Mi opinias ke ne. Tio ne estas elbarita.</i> |
| 12. De moeder is zwak. Ik heb met hem te doen. <i>La patrino estas trocedema. Mi plendas lin.</i> | 92. En nu, ter zake ! Hij heeft goede manieren. <i>Kaj nun, al la temo ! Li havas bonmanieron.</i> |
| 13. Ik denk het te doen. Diep in den nacht. <i>Mi intencas fari ĝin. Malfrue en la nokto.</i> | 93. Zet je hoed op. Het is bij hem niet pluis. <i>Metu vian ĉapelon. Li estas iom frenezeta.</i> |
| 14. Dat is niets gedaan. Wie zwijgt stemt toe. <i>Tiu utilas neniom. Kiu silentas, konsentas.</i> | 94. Ik heb geld zat. Hoe moet ik daaraan komen ? <i>Mi havas abundan monon. Kie mi trovos tion ?</i> |
| 15. Het is met hem gedaan. Dat gaat U niet aan. <i>Li atingis la finon. Tio ne koncernas vin.</i> | 95. Dat heeft niets te zeggen. Niks voor niks. <i>Tio ne gravas. Por nenio oni faras nenion.</i> |
| 16. Hij is voor de poes. Dat doet er niet toe. <i>Li estas forperdita. Tio estas indiferenta.</i> | 96. Pak beet ! Hij laat alles op mij aankomen. <i>Kaptu ! Li lasas min fari la tutan laboron.</i> |
| 17. Hij redeneert gezond. Er is geen doen aan. <i>Li ĵuste rezonadas. Tio ne estas farebla.</i> | 97. Heb je niets te doen ? Dat maakt niets uit. <i>Ĉu vi havas nenion por fari ? Estas nenio.</i> |
| 18. Je moet beslist gaan. Hij zit in den raad. <i>Nepre iru. Li estas ano de l' konsilantaro.</i> | 98. 't Is wat te zeggen ! Dat is mijn zaak niet. <i>Estas malagrabla afero ! Tio ne tuŝas min.</i> |
| 19. Je hebt goed praten. Ik zal stellig komen. <i>Vi povas facile diri tion. Mi nepre venos.</i> | 99. Zet ze naast elkaar. Laat U dat gezegd zijn. <i>Metu unu flanko de l' alia. Bone notu tion.</i> |
| 20. Hoe staan de zaken ? Mijn hoofd doet zeer. <i>Kiel marŝas la aferoj ? Mia kapo doloras.</i> | 100. Zaken zijn zaken. Uw dienstwillige dienaar. <i>Amikeco aparte, afero aparte. Via servema.</i> |

Ieder lid van FUKÉ ook lid van IKUE en abboné van ESPERO KATOLIKA

DISTRA ANGULETO

VI MIRU

En sudokcidenta Vestfaliao svatanto scias, ke lia edziĝpeto estas malakceptata, kiam la patrino de l'knabino, ĉe lia vizito, ŝmiras por li buterpanon kaj ĝin al li enmanigas.

* * *

Kiam la ino de vircikonio mortas antaŭ ol ŝi elkovis la demetitajn ovojn, tiu serĉas novan kunulinon, por ke ŝi finkovu ilin.

* * *

Kiam en 1786 naskiĝis en Strasburgo filo al regimentestro Maksimiliano von Zwiebrücken-Birkenfeld, liaj grenadistoj oferis al li kusenon remburlitan per iliaj

lipharoj, sur kiu la infano estis portata al la bapto.

* * *

Iam multaj eminentuloj timis esti venenotaj. Kiam oni post manĝo suspektis engluton de veneno, la kuracisto ordonis la pendigon ĉe l' piedoj, por ke la veneno elfluu el buŝo kaj oreloj. Kiam la malsanulo, sekve de tiu kuracmetodo « nur » perdis unu okulon, li povis konsideri sin feliĉa.

* * *

La porneĝaj okulvitroj, ŝirmportataj de skikurantoj en la montaro, jam estis uzataj sur Himalajo de post la deksepa jarcento. Fakte tiuj unuaj « okulvitroj » ne estis el vitro sed el iu delikata retteksaĵo. T.

ADVERTENTIETARIEF VAN FLANDRA KATOLIKO

verschijnend op 7 à 800 exemplaren

| | 1 Blz. | 1/2 blz. | 1/4 blz. | 1/8 blz. |
|-----------------------|----------|----------|----------|----------|
| I Jaar (10 nummers) : | 5000 fr. | 3000 fr. | 2000 fr. | 1000 fr. |
| Afzonderlijke adv. : | 1000 fr. | 500 fr. | 300 fr. | 200 fr. |

Tekst te zenden aan J. Merks, Hoofdredacteur, Goedendaglaan 109, Kortrijk. — Betaling op P.C. van het KATHOLIEK VLAAMSCH ESPERANTO VERBOND, Augustijnenstraat 35, Antwerpen. P.C. 4123.54

FLANDRA UNUIĜO KATOLIKA ESPERANTISTA.

Voorzitter : Lic. L. Calloens, Erembodegemstraat 29, AALST.

Proost : E. H. A. Beckers, leeraar. Normaalschool, MECHELEN-AAN-MAAS.

Kassier : P.C. 4123.54 van het K. V. E. V., Augustijnenstr. 35, ANTWERPEN.

Secretariaat en Inlichtingen : A. Bosschaert, Hanswijkvaart 43, MECHELEN.

Raadsman stichting afdelingen : Dr. M. Naster, Schuttersvest 64, MECHELEN.

Bestelling boeken : P.C. 1194.82 : D. Mortelmans, Egied Segerslaan 14, WILRIJK.

Bestelling cursus : P.C. 4850.64 : M. Bergmans, Post, WEERDE.

Vraagbaak spraakleer : E. H. Canisius van Hoogstraten, Abdij, GRIMBERGEN.

Maandblad : K. Hartmann, Augustijnenstraat 35, ANTWERPEN.

Propagandaleider : J. Douwen, A. van Daelstraat 2, WILRIJK.